

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Okazos

Jarkunveno 2024

En feb. 18 (dim) okazos en la Muzeo, Jarkunveno de nia rondo pri la raporto de la jaro 2023 kaj la plano de 2024.

Hama-Ronda Tago

En 31. Mar. (dim) okazos en la Muzeo, Hama-Ronda Tago kun la temo "Serio Oriento-Okcidento", la literatura libroserio.

La Jar-kajero 2023-a de Neprofitocela Organizo Esperanto Jokohama

Jen estas la skizo de la ĉefaj eventoj en 2023. noto: [MZ] estas por Esperanto-Muzeo Jokohama. [IR] por interreto.

*jan. 29 [MZ] La Jarkunveno de nia rondo, kun aprobo de la antaŭjara raporto kaj kaso, de ĉi-jara plano kaj buĝeto, kaj la nomumo de la estraranoj, ĉiuj aprobitaj.

*feb. 14 [MZ] S-ro Garry Evans el Kanado vizitis la Muzeon.

*mar. 3 [IR] la 127a legokunsido, pri "Vojaĝo al Kazohinio, dua parto" de Sándor Szathmári, kun 4 personoj.

*mar. 24 - apr. 9 [Riverbordo de Rivero Oooka] Estis Festenado pro apreci sakur-florojn laŭborde de Rivero Oooka, kun pendlanternoj por prilumi sakurojn vespere. Al tio ni oferdonis 6 lanternojn per nia nomo.

*mar. 25 [MZ] Ges-roj Dieter kaj Yoshie Kleemann vizitis la Muzeon.

*apr. 25-30 / jul. 25-31 / sept. 26-okt. 1 / nov. 1-5 / dec. 6-11 [en diversaj galerioj] S-ino Miyazaki Hideko ekspoziciis sian litografajon pri la Muzeo en pluraj ekspozicioj.

*jun. 2 [IR] la 128a legokunsido, per la libroj

elektitaj mem de la 4 kunsidantoj.

*jul. 29 [en la 108a UK en Torino, Italio] Ĉe la kongresa Movada Foiro, s-ro Namba Fumiharu disdonis flugfoliojn pri nia muzeo.

*sept. 1 [IR] la 129a legokunsido, pri "Sur bluaj planedoj" de Laure Patas d'illiers, kun 5 personoj.

*sept. 9 [MZ] 8 membroj el Esperanto-Klubo de Maĉida vizitis nin, kaj parolis kun niaj 5 membroj.

*okt. 7 [MZ] Prezento de spertoj de niaj membroj. Estis 8 prezentoj, kun speciala prelego de asociita profesoro Kamimura Kazumi. Ĉeestis 14.

*okt. 21 [MZ] S-inoj Mirejo Grosjean, Sonia Daubercies kaj Martine Moine el Svislando vizitis la Muzeon.

*nov. 13 [IR] S-ro Doi Hirokaz rete parolis pri nia Muzeo, okaze la 105a AMO-Seminario.

*dec. 1 [IR] la 130a legokunsido, pri "Arne, la ĉefido" de Leif Nordenstorm, kun 4 personoj.

*dec. 17 [Halo Umeco en Urbo Odawara] la 53a Zamenhof-Festo de Gubernio Kanagawa, kun ĉeesto de 26 personoj. El nia grupo estis prelegoj de Namba Fumiharu, Sibayama Zyun'iti kaj Murata Kazuyo. La libroservon prizorgis ge-sroj Doi.

La 130-a Legokunsido

En la 1a de decembro 2023 okazis la 130-a legokunsido por "Arne, la ĉefido" de Leif Nordenstorm. Partoprenis 4.

Simpla kaj interesa, Arne la ĉefido

Mizro Iwaya

Tiu ĉi estas facila legaĵo, ĉefe por infanoj. La scenejo estas norda lando en Eŭropo en la naŭa jarcento. Loĝis centoj da homoj en iu vilaĝo. Arne, 11-jara knabo, estis filo de la ĉefo. Li ofte ludas kun sia amiko Gunnar sur herbejo aŭ apud la lago. Fojfoje partoprenas ankaŭ Trumbe, sklavo kun la sama aĝo. Li estis aĉetita de Björn, ĉefo de la vilaĝo kaj la patro de Arne. Iun tagon Arne trovis du migrantojn sur la vojo. Ili estis mizere vestitaj kaj petis helpon de la vilaĝanoj. La knaboj informis la vilaĝanojn pri tio kaj la du migrantoj venis al ilia vilaĝo. Ili gastis tie kaj baldaŭ foriris. Krom tio, Arne trovis strangan ŝipon venantan al la golfo de la vilaĝo. Li memoris ke la migrantoj diris ke ili estis atakitaj de piratoj kaj prirabitaj je ĉiu "ĉombo". Estis nenio alia ol bonŝanco, ke ilia vivo ne estis rabita. Pro la apero de la stranga ŝipo la tutaj vilaĝanoj estis teruritaj kaj forfuĝis trans montoj al najbaraj vilaĝoj. Fortikaj viroj restis en la vilaĝo kaj pretigis sin por la venonta batalo. Sed baldaŭ klariĝis ke ili ne estis piratoj. La vilaĝanoj trankviliĝis kaj havis etan festenon.

Troviĝas tie tri temoj. La unua estas sklavo. En la naŭa jarcento aŭ simila ekzistis multaj sklavoj en Eŭropo. Ili estis traktataj malfavore. Ili devis dormi sur la suba planko. Ili ne rajtis preni armilon eĉ dum la infanludo. Ili devis nur obei la mastron. Sed Arne vidis ke tio estas iom

stranga ĉar Trumbe estas tute normala knabo. Kial oni devas trakti lin speciale? Li decidis ke almenaŭ li sola traktos ĝentile al li.

La dua temo estas kristanismo. Laŭ la aktuala historio la kristanismo venis al Svedio ĉirkaŭ la naŭa jarcento. Ĉi tie aperantaj du migrantoj estis fakte misiistoj al nordaj landoj. Arne estis mirigita de la kruca gesto kiun ili faris, ĉar li mem vidis tion faratan de Trumbe. La vilaĝo mem estis en antikva paganismo, sed la loĝantoj komencis inklini al nova religio.

La tria temo estas piratoj. Vikingoj estis famaj en tiu regiono. Prapatroj de Arne ofte batalis sur la maro. Sed nun ili faras ordinarajn komercojn kaj kultivon, paŝtadon en tiu tempo. Sed fakte piratoj aktivis tie kaj ĉi tie. Do la vilaĝanoj tre timis ilin. Se ekzistas ties ebleco, ili tuj pretigas sin; virinoj kaj infanoj forfuĝas kaj viroj pretigas sin batali. Kiam evidentiĝis ke ili ne estas piratoj, do la vilaĝanoj fariĝis tute trankvilaj kaj komencis festenon. Tia estis la teruro al piratoj.

Tiu ĉi libro sobre rakontas la okazaĵojn. Sed se ni detale pripensas la historion, ni povas trovi latentan gravecon de la epizodoj. Ja facilaj frazoj kaj facila enhavo, sed ni povas sufiĉe ĝui la tutan verkon.

"Arne la ĉefido" kompare de "La Ŝtona Urbo"

Sibayama Zyun'iti

Ĉi-foje legita rakonto "Arne, la ĉefido" de Leif Nordenstorm, estas kvante kredeble dekone malgranda ol la antaŭe legita romano "La Ŝtona Urbo" de Anna Löwenstein, sed donu al mi kelkajn temojn por komparo.


En "Arne", la protagonisto vizitas monteton,

kie oni oferas bestojn al loka dio, tial bestostoj troviĝas. En "Urbo", la protagonisto vizitas monteton, kie oni oferas vivantan homon al loka dio. Ĉu tio estas pro la tempopaso, ke "Arne" okazas 8 jarcentojn post "Urbo"? Ĉu tio estas pro la celataj legantoj: "Arne" al geknaboj,

“Urbo” al plenkreskuloj? Malgraŭ tiu diferenco, la etoso de “Arne”, nome la marbordo de la Skandinava Duoninsulo, kaj tiu de la unua triono de “Urbo”, nome la sudo de la Brita Insulo estas tre simila al la okulo de mi, loĝanta en Orienta Azio.

En la 9a jarcento laŭ “Arne”, Kristanismo venas al la vivsfere de la protagonistoj, aŭ per vizitantaj religiuloj aŭ per sklavoj. En “Urbo”, kristanismo venas al Romo per speciale entuziasmiĝintaj kredantoj.

Sed la plej okulfrapaj komunaj aferoj en ambaŭ libroj temas pri “sklavoj”. La ĝenerala bildo pri sklavoj por multaj japanoj estis formitaj, kredeble per la sklavoj iamaj en Ameriko forkaptitaj de Afriko. Sed la situacio en la nomitaj libroj estas: oni



fariĝas sklavoj pro malvenko en batalo, kaj perforte deportitaj al foraj lokoj, sed ilia vivo, kvankam en limigita, neforkurebla spaco, ne estas korpe katenita. La laborsistemo iel similas al nuntempaj salajratoj ligitaj al laborejo, en kuranta Japanio. Estas interese scii, ke eĉ sklavo povas malsklaviĝi per akumulo de mono.

Tiaj estas mia komparado de la du libroj. Nu, pri tiu ĉi libro “Arne” mem, la protagonist Arne estas filo de vilaĝa (aŭ klana?) ĉefo, kaj li estas metata en streĉan situacion, sed tie

ne okazas efektiva rabado nek militado. Ĉu li bezonos renkonti tian vivmalfacilon, por esti vera “ĉefo” en la estonto?

Omaĝe al la 100-jara jubileo de Esperanto-Klubo en Odawara, okazis la 53a Zamenhof-Festo de Kanagawa

La Urbo Odawara, situanta en la okcidenta marbordo de la Gubernio Kanagawa, estis histori-riĉa urbo en la japana historio, kaj speciale la jaro 2023 estas grava por ties esperanta agado: En marto 1921, 2 esperantistoj, s-ro Togu Toyosato kaj s-ro Yosikawa Yasuo fondis klubon tie. Celebrante tion, ties grupo publikigis 32-paĝan broŝuron pri la movado-historio kun plene da koloraj fotoj, en la japana lingvo.

Tiu publikiga evento karakterizis la 53an Zamenhof-Feston de Kanagawa, la 17an de

decembro 2023, kun 26 partoprenantoj, el kiuj 20 efektive vizitis halon karesnomatan “Umeko” (prononcu: umeko) en Odawara, de 14:30 ĝis 17:45.

La inaŭguro farita de s-ro Okutu Sintaro el Odawara, estis rete sendita al la samtempe okazanta Esperanto-Festo en Tokio, kun prezento de la nomita broŝuro. Poste, s-ro Yamano Yutaka el Urbo Tyoohu [ĉofu] videe prezentis la Esperanto-agadon en 1921 – la tiama agado de la Togu rilatis al la literaturistoj tiam agantaj en Tyoohu. Antaŭ ol la fino, veterana s-ro Nakai



Hayasi rememore parolis pri la agado en 1960-aj jaroj.

En la Festo okazis multaj prelegoj rilate historiajn aspektojn, kiel jene.

S-ro Namba Fumiharu (el Jokohamo) parolis pri la origino de “Umeco” – Fakte la halo estis nomita laŭ elefanto nomata “Umeco” (= ido de umeo, simbola floro de Odawara). Tiu elefanto venis al la zoo de Odawara post la dua mondomilito kaj multe amuzis la urbanojn.

S-ro Sibayama Zyun’iti (el Jokohamo) parolis pri la esperanto-poeto Clarens Bicknell (1842-

1918), kaj deklamis liajn poemojn; Li en 1909 kaj 1910, en la plej fruaj jaroj de la japana Esperanto-movado, kontribuis poemojn al tiama gazeto “Japana Esperantisto”.

S-ino Murata Kazuyo (el Jokohamo) prezentis pri la idoj (gefiloj, genepoj, gepranepoj) de L.L.Zamenhof, la kreinto de Esperanto.

Dume estis tempo por aĉetumi Esperantajn librojn, prezentitajn de JEI kaj de Esperanto Jokohamo.

Post la Festo, multaj vizitis japanstilan restoracion. (Sibayama Zyun’iti)

La fondinto de Duolingo montris pri la influo de AI al alilingva lernado

En la reta versio de komercado-gazeto *NIKKEI Business* aperis artikolo de intervjuo al la fondinto de Duolingo, d-ro Luis von Ahn. En la intervjuo li komentis diversajn aferojn, pri la sukceso de la lingvo-instrua apo Duolingo, pri la uzantoj de la apo tra la mondo, pri la utiligo de AI (artefarita inteligenteco) por la progreso de Duolingo, ktp.

En diversaj opinioj de la d-ro, mi (NAMBA) precipe interesiĝis al la respondo de demando “Oni montras ke pro la progreso de AI, tradukila aplikaĵo progresigas sian precizecon. En tiu epoko, kio estas la graveco lerni lingvojn?”

“Eĉ per la maŝina tradukilo, ekzemple inter la angla kaj hispana, Google Traduko estis jam senprobleme preciza antaŭ ĉirkaŭ 10 jaroj. Tamen, la nombro de tiuj kiuj lernas la hispanan

tute ne malmultiĝas.”

“Homoj kiuj eklernos lingvon povos plimultiĝi, sed ne povos malmultiĝi. Almenaŭ, ĝis nun mi ne vidis la analizon ke troviĝas la antaŭgusto malmultiĝa.”

Ankaŭ en Esperantujo, kelkaj homoj opinias pri la graveco de alilingva lernado kaj la influo de tradukilo kun AI. Tamen, mi ĝis nun tute ne vidis tiel konkretan observon pri la influo de komputilaj tradukiloj al la lernado. Pro la AI, la graveco de Esperanto tute ne malmultiĝos, sed plimultiĝos. Nun estas la ŝanco multigi la lernantojn de nia lingvo! Mi tiel sentis pro la opinio de d-ro Luis.

Jen estas la adreso de artikolo (japanlingve). Mi rekomendas ĝin.

(Namba Fumiharu)

<https://www.nikkei.com/article/DGXZQOUC271MFOX21C23A2000000/>

sezonvorto januara

Neĝflokoj

Okita Kazumi

Flirte dancantan neĝon en la bela kaj blua ĉielo oni nomas “neĝflokoj”. Oni povas vidi tian naturan fenomenon, ekzemple kiam neĝo en la montaro estis forblovita de la vento.

En hajko ĝi estas sezonvorto^(*) de malfrua vintro kaj esprimas belan kaj efemeran pejzaĝon de vintro. En nordaj regionoj ĝi antaŭsignifas veran alvenon de vintro.

(*) 風花 (かざばな)

